

La Riverego kebekia esperantista bulteno

Marto 2006

Esperanto-Societo Kebekia

Jaro 21, No 83

Ĝojan Kristnaskon! — Eŭropo de 1914 ĝis 2006

François Lorrain

Eble jam pluraj inter vi vidis la filmon «Joyeux Noël !», inspiritan de historiaj okazaĵoj dum la mondmilito de 1914–1918. Laŭ la historiisto André Champagne, temas pri la plej granda humaneca momento en la tuta milito.

Ĝis septembro 1914, la armeoj de la centraj imperioj, Germanujo kaj Aŭstri-Hungarujo, avancis preskaŭ ĝis Parizo, sed estas poste repuŝataj. En oktobro, la fronto en nord-orienta Francujo atingas plimalpli stabilan staton, preskaŭ ne plu ŝanĝiĝontan ĝis 1918, malgraŭ daŭra interbuĉado. Ekde tiu stabiliĝo, jam en oktobro, post la unuaj grandaj, absurdaj intermasakroj, soldatoj ambaŭflankaj komencas dubi pri siaj superuloj, kaj, ie kaj tie, iam kaj tiam, okazas interfratiĝaj « incidentoj » inter kontraŭuloj sur la fronto.

Proksimiĝas Kristnasko. La germana alta komandantaro sendigas al la fronto cent mil kristnaskajn abietojn — po unu je ĉiu kvina metro laŭ la tuta fronto! Vespere de la 24a oni festetas.

Iuj ekkantas. Malamikoj en siaj apudaj tranĉeoj (ofte distancaj je malpli ol cent metroj) aplaudas kaj mem ekkantas. Oni alparolas sin de tranĉeo al tranĉeo. Homoj kolektiĝas en la momente ne plu danĝeriga «no man's land» inter la tranĉeoj, bondeziras, babilas, kuntrinkas, interŝanĝas ĉokoladon, cigaredojn... Same okazas en pluraj lokoj de la fronto. Kelkloke, malamikaj oficiroj, renkontiĝinte, eĉ proprainciante dekretas kristnaskan militpaŭzon.

Eble eĉ tiam renkontiĝis Esperantistoj de ambaŭ flankoj, kiuj uzis Esperanton por interkompreniĝi! Jen interesa sceno, kiun mi nepre aldonus al la filmo!

Ĉar ili spertis la saman inferon, tiuj subite fratiĝintaj tiel nomataj « malamikoj » estas pli proksimaj unuj al la aliaj ol al siaj sekure vivantaj, ŝirmataj superuloj. Sed por ĉi tiuj tiaj rilatoj inter kontraŭbatalantoj konsistigas « ŝtatperfidon », « interkonsenton kun la malamiko », do ege punendajn agojn. Poste la altaj

aŭtoritatoj de ĉiuj armeoj eksplicite malpermesis fari kion ajn tian; sed tiam, kristnaske de 1914, estis tiom da « kulpuloj », ke ne eblis militprocesi kontraŭ ili ĉiuj. Fakte, ŝajnas, ke neniu militproceso estis starigita pri tiu afero. Plurajn fratiĝintojn trafis malrektaj formoj de puno: ekzemple, iuj trupunuoj estis disigitaj, kaj aliaj estis senditaj al pli danĝeraj lokoj. Kia tragedio por tiuj homoj, punataj ĉar ili estis pli humanaj, pli noblaj ol iliaj superuloj, malproksimaj de la ĉiutaga tranĉea ekzistado!

Hodiaŭ, pli ol naŭdek jarojn poste, tiu filmo ne levas grandan debaton. Tamen, se iuj petus, ke, nome de la principoj de humaneco kaj nobleco, kiujn ni pretendas servi, estu rehonorigataj la tiam punitaj soldatoj, ili certe renkontus, eĉ hodiaŭ, fortegan rezistadon ĉe la politika kaj militista hierarkio. Blinda obeemo, jen kio estas postulata de soldato. Ja pli malfacilas pafi iun, kiun oni konas kaj estimas, ol iun nekonatan, sennoman, senvizaĝan, pro sufero, timo kaj propagando malamatan.

Agnoskendas, tamen, ke, de tiu fora Kristnasko ĝis nun, Eŭropo ja progresis. La nun konstruiĝanta

Ĉar ili spertis la saman inferon...

Ĝojan Kristnaskon... (sekvo de la unua paĝo)

François Lorrain

Eŭropa Unio, kuniganta tiom da iamaj malamikoj, konsistigas ja miraklon, preskaŭ nekredeblan, se rigardi ĝin per la okuloj de 1914 aŭ 1939... Tiurilate, Eŭropo ŝajnas al mi — malgraŭ ĉiaj kritikindaĵoj — la regiono de la terglobo, kie politika organizado plej antaŭeniris. Ni esperu, ke ĝi neniam plu refalos en la iamajn interlandajn malamojn.

Interesa fakto estas, ke en la preparado de la filmo, reĝisorita de la franco Christian Carion, kunlaboris aktoroj kaj skipoj el la tri ĉefaj tiam interbatalintaj landoj: Britujo, Francujo kaj Germanujo. Estis ankaŭ rumana skipo.

Detalon en la filmo mi malŝatis. Aperas en ĝi paro de kantistoj, laŭ mi superflua, eĉ ĝena. Ne gravas, ĉu temas pri historia okazaĵo aŭ nura inventaĵo de la filmisto. Oni ja

enmetu romantikan elementon en la filmon, sed ion malpli artefaritan! Mi finos per rimarko pri nura detaĵeto, sed iom grava por mi. Mi estas amatoro de latino. En la filmo mi aŭdis du erarojn en tre konataj latinaj frazoj: *In nomine patris, filii et spiritus sanctu* anstataŭ *sancti*, kaj *Venite adoramus* anstataŭ *adoremus*. Laŭdire estus aliaj tiaj eraroj. Iu malsaĝe fidis je sia memoro kaj ne kontroligis la latinajn tekstojn. Tamen ne mankas homoj, kiuj povus rapide korekti tiajn malgaltaĵojn, tute elementajn por studentoj de tiu morta lingvo.

Interesiĝantoj povas aŭskulti la komentariojn de la historiisto André Champagne pri la filmo ĉe <http://radio-canada.ca/radio/samedidimanche/> en la elsendo de dimanĉo 18^a de decembro 2005, 3^a parto.

Petskribo...

Elizabet'

Trovita ĉe Edukado.net : <http://www.edukado.net/anoncoj/14329>
Jen ligilo al petskribo-paĝo por ke Unuiĝitaj Ŝtatoj (UN) aprobu Esperanton - necesas eĉ ne minuto por subskribi!

<http://www.petitionspot.com/petitions/ESPERANTO>.

La 19^{an} de februaro je la 19^a horo estas 90 subskriboj el unu miliono.

La 20^{an} de februaro je la 17^a horo estas 324 subskriboj.

Je via vico !



**Société québécoise d'espéranto
Esperanto-Societo Kebekia**

La Riverego (Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto quatre fois par année, en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux : Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 0830-9574. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise avec mention obligatoire de la source. Photocopié à 90 exemplaires. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto. Rédaction : Jérôme Frédéric Bouchard (jero@esperanto.qc.ca). Administrateurs de la SQE : Normand Fleury (président), Martin Benoit (vice-président), Boris-Antoine Legault (secrétaire), Sylvain Auclair (trésorier) et Vincent Riendeau (conseiller) .

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia kvarfoje dum la jaro : marte, junio, septembro kaj decembre. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Fotokopiita 90oble. Senpage por la membroj de la ESK. Por la aliaj, la jara abono kostas 10 kanadajn dolarojn. UEA-kodo de la Societo : kebk-d. Redaktado: Jérôme Frédéric Bouchard (jero@esperanto.qc.ca). Estraranoj de ESK : Normand Fleury (prezidanto), Martin Benoit (vicprezidanto), Boris-Antoine Legault (secrétaire), Sylvain Auclair (kasisto) kaj Vincent Riendeau (konsilanto).

Échéance pour le prochain numéro / *Limdato por la venonta eldono* : 2006.02.20

6358-A, rue de Bordeaux • Montréal • H2G 2R8 • informo@esperanto.qc.ca • www.esperanto.qc.ca

Ĉu esperanto atingos du jarcentojn?

Sylvain Auclair

Mi ĵus trafolumis la scienc-prognozan libron « XXI^e siècle: les innovations qui vont changer notre vie », de Éric de Riedmatten. El cento da ontaj sciencaj aŭ teĥnikaj elspensaĵoj, du certe mortigos nian Internacian Lingvon.

Nu, laŭ la jamaj sciencaj esploroj, Riedmatten kredas ke, jam en 2019, estos inventita aŭtomata paroltradukilo enmetebla en la ORELON, kiu kapablos traduki el ĈIUJ LINGVOJ en la gepatran lingvon de la aĉetinto. Nomita Ear You Are, « cet incroyable saut technologique pourrait mener tout droit à la suppression des cours de langues dans les écoles... encore que le système, bien que révolutionnaire, ne permette pour l'instant que de traduire en simultané des textes perçus par l'oreille. »

Sed tiu ŝajne ne sufiĉos. Tial, la aŭtoro antaŭvidas, por 2087 (kia dato!) post 50 jaroj da internaciaj negocoj, enkondukon de facila internacia lingvo, nomita la UNa (france: onusien). La pakto estos subskribita sur artefarita ventenergia insulo meze de Atlantiko, nomita Nowhere Island, en la UNa: Isole Nopara.

Tiu lingva decido devus veni post la eksgraviĝo de la angla, unue pro la kreo de la lingvaĵo « short message » por la poŝtelefonaj tekstomesaĝoj kaj la retleteroj; due pro la graviĝo de la rusa kaj

azia ekonomioj, kiu kondukas al la demando, kial Ruso aŭ Ĉino parolu la anglan? La aŭtoro sekve antaŭvidas regravigon de Esperanto ĉirkaŭ 2037 (ĝia 150-jariĝo), kio tamen ne solvas ĉiujn problemojn (kvankam li ne diras kial). Tamen, kaj Esperanto kaj Volapük (!), ĝia antaŭulo (!) estiĝas bazo de la nova UNa. Eĉ estas la neŝatataj ĉapelitaj literoj! « On y retrouve certaines consonnes à circonflexes d'origine slave. Les racines demeurent invariables comme en arabe et en hébreu, les mots sont courts, le vocabulaire très limité, et la grammaire simplifiée suivant le modèle persan. Les linguistes ont ajouté un certain nombre de références chinoises. (...) Au total, deux cents heures d'apprentissage permettent actuellement de communiquer dans le monde entier, alors que l'anglais nécessite plus de 2 000 heures. » Kaj ĝi estos instruata jam de infanĝardeno!

Tiu nova lingvo do estus kreata de internacia komitato, kun komparo kaj negoco de la diversaj esperoj. Ekzemple: « Chaque nation signataire du traité a fait part de ses attentes, et accepté le caractère occidental. »

Kiu diris, ke kamelo estis ĉevalo konceptita de komitato?

XXI^e siècle, les innovations qui vont changer notre vie. Éric de Riedmatten. Paris: L'Archipel, 2005. 413 p.

Bankkonta programo...

Jean-Louis Carré

Por facile mastrumi la personajn monajn problemojn ekzistas libera (tute senpaga) programo nomita « Economix ». Ĝi estas simplega, ege fleksebla kaj personigebla.

Nun ĝi estas havebla ankaŭ en Esperanto !

Plie, ekzistas versioj por Windows, Mac OS9 kaj Mac OS X (bedaŭrinde, ŝajnas, ke la Eo-versio por Linux ne estas preta). Ĝi estas elŝutebla ĉe : <http://callix.chez-alice.fr>

Logiciel de gestion bancaire...

Jean-Louis Carré

Pour gérer facilement les problèmes d'argent, il existe un logiciel libre (tout à fait gratuit) nommé « Economix ». Il est très simple, très souple et personnalisable.

Maintenant, il est aussi disponible en espéranto !

De plus, il existe des versions pour Windows, Mac OS 9 et Mac OS X (il semble malheureusement que la version pour Linux ne soit pas prête). Il peut être téléchargé sur : <http://callix.chez-alice.fr/>

Konkurso!

Martin Benoit

ESK lanĉas konkurson pri T-ĉemiza desegno! Ni do volas presi T-ĉemizojn por vendi ilin, kaj ni bezonas ideojn kaj konceptojn por trovi la presotan desegnaĵon. La konceptoj plejeble devos kovri la du flankojn de la vesto, esti originalaj kaj belaj por porti, prezenti Esperanton kaj allogi la rigardon.

La gajninto estos elektita la 3^{an} de aprilo dum estrara kunsido el sugestoj ricevataj, kaj ricevos T-ĉemizon kun sia propra koncepto! Vi povas sendi viajn desegnajn ideojn (du maksimume), laŭ la formato de du paĝoj por la antaŭo kaj la malantaŭo de la T-ĉemizo, poŝte al ESK (6358-A de Bordeaux, Montréal QC H2G 2R8), aŭ retroŝte al marteno@esperanto.qc.ca, plej malfrue la 2^{an} de aprilo. Ni atendas viajn sugestojn senpacience!

Faux ami

Sylvain Auclair

Récemment, sur une publicité automobile, on pouvait lire le slogan suivant: «Louez le travail de nos ingénieurs». Comme beaucoup de jeux de mots, celui-ci ne fonctionne plus en espéranto.

En effet, *louer, faire la louange*, se dit *laŭdi*. Par contre, *louer, prendre en location*, se dit *lui* ou *lupreni*. À l'opposé, *louer, donner en location*, se traduit par *luigi* ou *ludoni*.

Attention à ne pas prendre la première traduction qu'on trouve dans un dictionnaire, comme ce vieux traducteur de poche qui, pour «I miss you», proposait «Je demoiselle tu»...

Concours!

Martin Benoit

La SQE lance un concours de dessin de T-shirt! En effet, nous voulons imprimer des T-shirts en vue de les vendre, et nous avons besoin d'idées et de concepts pour trouver le dessin qui sera imprimé. Les concepts doivent idéalement couvrir les deux côtés du vêtement, être originaux et beaux à porter, présenter l'espéranto et attirer le regard.

Le gagnant sera choisi le 3 avril à la réunion du C.A. parmi les suggestions reçues et se méritera un chandail avec son propre concept! Vous pouvez envoyer vos idées de dessins (deux au maximum), sous le format de deux pages de format lettre représentant le devant et le derrière du T-shirt, par la poste en envoyant à la SQE (6358-A de Bordeaux, Montréal QC H2G 2R8), ou par courriel à marteno@esperanto.qc.ca, et ce, au plus tard le 2 avril. Nous attendons vos suggestions avec impatience!

Pasporta Servo

Derk Ederveen

Ĉiuj esperantistoj konas la Pasportan Servon : temas pri libreto kiu entenas nomojn kaj adresojn da geviroj kiuj pretas gastigi esperantistajn vojaĝantojn senpage. Tiu teksto estas komunikaĵo el la kompilanto de Pasporta Servo.

Eldono 2006 bedaŭrinde ne sukcesis atingi novan rekordon de 1400 gastigantoj, sed la 1320 gastigantoj troveblas en 92 landoj, kio jes estas nova rekordo. Novaj landoj kiuj (re)aperis estas Burkino, Burundo, Ĉadio, Domingo, Egipto, Komoroj, Nepalo kaj Slovenio. Aliflanke malaperis Bjelorusio, Gabono, Grenado, Indonezio, Kongolo kaj Turkio.

Kiam vi vidos la novan eldonon, vi eble rimarkos ke la aspekto iom ŝanĝiĝis. Tion kaŭzis la nova administra sistemo kiu estis enkondukita por faciligi redaktadon. Ĝi montriĝis havi aldonan gravan avantaĝon, ĉar eblis redukti la nombron da paĝoj de 224 al 188. Malpli peza, kaj malpli kosta. Ni uzis la okazon por enkonduki kelkajn novajn simbolojn.

Fine de januaro mi anstataŭos eldonon 2005 per eldono 2006 en la TTT-ejo, februaro/marto mi publikigos ŝanĝojn kaj aldonojn al la nova eldono.

<http://www.tejo.org/ps>

Pasporta Servo strebas atingi 1400 gastigantojn en eldono 2007!

Helpu nin!

Esperanta rakonteto

Mariza Mongeau

Vintra mateno

Estis la dua de februaro. La suno altiĝis kaj plenigis da lumo la ĉambrom de Nataŝa. Ŝi vekigis kaj ekallitiĝis pro tio ke ŝi devis iri al la lernejo.

— Bonan matenon Nataŝa! diris Paŭlo, ŝia patro, kiam ŝi eniris la kuirejon.

— Bonan matenon paĉjo! ŝi respondis iom malĝoja.

— Kial tia tristeco?

— Ha, ve! Vi scias, mi devus esti en la lernejo jam de preskaŭ duonhoro! Mi tro malfruas!

— Ne zorgu pri la horo, ĉu vi ne vidas la neĝon? Pro tia vetero, la lernejo ne malfermiĝis ĉi-matene.

— Kiel vi povas scii?

— Nataŝa, la lernejestro ĵus anoncis al ĉiuj, per la radio, ke la lernejo estas fermita hodiaŭ.

— Bone! Vi reĝojigas min.

— Ne mi igis la lernejon tiel decidi.

— Nu, tamen, vi sciigis al mi...

— Ĉu vi bone dormis?

— Jes, mi tre bone dormis, sed mi malbone vekigis...

— Vi aspektas malsata, kion vi volas manĝi?

Multe da neĝo

Post la matenmaĝo, Nataŝa surmetis sian ruĝan mantelon, kaj ŝi eliris el la domo. Ne por iri al la lernejo, ŝi eliris. La lernejo estis fermita, kaj nun, ŝi sciis tion. Ŝi iris en la ĝardenon, promenis iomete, kaj rigardadis la blankan neĝon kiu estis ĉie ĉirkaŭ ŝi. Ŝi nun havis

esprimon de miro sur sia visaĝo, ĉar ŝi neniam vidis tiom da neĝo.

Tiu blanka, granda kovrilo iom timigis ŝin.

— Paĉjo, de kie venas tia neĝo?

Sed la patro ne respondis.

— Venu, mi montros ion al vi, li kontentis diri.

Tiu vintro estis la plej malvarma de ĉirkaŭ dek jaroj, kaj Nataŝa estis nur sepjaraĝa. Ŝi sekvis sian patron ĝis la mezo de la ĝardeno.

La neĝdomo

— Nun, vidu! ekkriis Paŭlo post kelkaj minutoj.

Nataŝa rigardis, kaj ŝi vidis monteton da neĝo fronte al si. Paŭlo montris al ŝi etan truon je la alia flanko de la neĝmonteto, kaj ŝi eniris.

Post iom da tempo, ŝi ne plu volis resti sub la blanka kovrilo. Ŝi eliris el la neĝdomo kaj kuris al sia patro.

— Ĉu estas mia dometo? ŝi demandis.

— Jes certe estas via dometo. Ĉu ĝi plaĉas al vi?

— Jes, sed ĝi estas iom tro malgranda. Mi pli ŝatus se ankaŭ miaj amikoj povus enveni kun mi.

— Sed viaj amikoj ne estas ĉi tie. Vi estas tute sola hodiaŭ.

— Ne! Mi ne estas tute sola, vi estas kun mi! Aŭ ĉu vi iru labori?

— Ne. Estas lundo. Mi neniam laboras lunde. Mi laboras de mardo ĝis sabato.

— Do ĉu vi grandigus la neĝdometon por ke almenaŭ ankaŭ vi povu eniri?

La dometo grandiĝis

Ludi per neĝo estis tre amuze por ambaŭ Paŭlo kaj Nataŝa, sed Paŭlo ne grandigis la dometon de neĝo. Li estas la patro, mastro de la hejmo, kaj li havis aliajn aferojn pri kiuj okupiĝi.

Tamen, li ne volis malĝojigi sian filinon. Li do donis al ŝi la ŝovelilon por ebligi ŝin grandigi la dometon. Nataŝa konsentis kaj ŝi prenis la ŝovelilon. Plue, ŝi ne malĝojigis. Tuj kiam ŝi prenis la ŝovelilon, ŝi turnis sin al la neĝmonteto kaj komencis labori por grandigi ĝin. Ŝi eniris kaj eliris multajn kaj multajn fojojn, kaj ĉiam, ŝi portis neĝon kaj metis ĝin supren.

Tiel, kiam ŝi reiris hejmen por manĝi tagmeze, la neĝdometo estis sufiĉe granda por du personoj. Nun, Nataŝa treege ŝatis la neĝon, ĉar ŝi povis ludi multe per ĝi. Posttagmeze, bone manĝinte, Nataŝa reeliris el la domo, vestita de sia ruĝa mantelo. Ŝi volis plu grandigi la neĝdomon, por kunvenigi siajn amikojn.

Amika ludado

Lundon, Nataŝa ne faris tiom da aferojn. Ŝi nur zorgis pri la neĝo, kaj pri la dometo. Mardon, la stratoj ne plu estis kovritaj de neĝo, do Nataŝa iris al la lernejo. Tiun matenon, ŝi ellitiĝis frue. Ŝi volis esti certa ke ŝi alvenu ĝustatempe.

— Ĉu vi venos kun mi en mian neĝdomon? ŝi demandis al ĉiuj el siaj amikoj.

Esperanta rakonteto... (sekvo)

Mariza Mongeau

Kiam ŝi poste revenis hejmen, ankaŭ la amikoj venis kun ŝi, kaj ili tuj iris al la neĝdomo por ludi abunde.

Ĉiuj knaboj kaj knabinoj amuziĝis la tutan tempon ĝis la vespero, kaj poste, ili reiris ĉe sin.

Merkredon, ili ĉiuj volis ankoraŭ ludi en la neĝdomo, sed kiam ili sekvis Nataŝan kaj alvenis ĉe ŝin, la neĝdomo ne plu estis. Iu malbonulo estis malkonstruinta ĝin. Unu el la knabetoj ploretis iom, sed tuj Nataŝa havis bonan ideon.

— Ni rekonstruu ĝin!

Kaj ili ekis la laboron.

Agu por la klimato!

Boris-Antoine Legault



Marŝo por la klimato

Montrealo, decembro 2005. Dum du-semajndaŭra pinta UNa konferenco pri klimatsanĝiĝo, okazis en la 3^a de decembro 2005 alia pinta evento: la unua tutmonda manifestaciario por la klimato!

El la 40 000 partoprenantoj de la Montreala manifestacio troviĝis

kelkaj dekoj da Esperantistoj, kiuj klopodis kuraĝigi ĉiujn unuopajn Esperantistojn kaj Esperantajn organizojn kunagi por urĝe bremsi klimatajn ŝanĝiĝojn. Porklimata Esperanta agadgrupo estis tiam starigita.

Pliaj informoj:
boris.legault@esperanto.qc.ca

Quelle heure est-il?

Sylvain Auclair

Dans les communications écrites que j'ai eu l'honneur de recevoir ces dernières semaines, j'ai pu repérer certaines erreurs fréquentes. J'espère que ces quelques rappels (ou peut-être nouveautés, pour certains), seront les bienvenus.

Pour indiquer une date, on utilise l'accusatif: *la evento okazos la 25^{an} de decembro*, ou bien *okazos mardon 25^{an} de decembro*. Bien sûr, quand il s'agit d'une période, on doit se rabattre sur des prépositions. Par exemple: *La kongreso daŭros de la 15^a ĝis la 22^a de julio*.

Par contre, quand il s'agit d'une heure, on doit utiliser la préposition *je*. Par exemple: *La tagmanĝo komenciĝas je la 11^a horo kaj 30 minutoj*. Évidemment, dans un tableau horaire, on peut faire preuve de plus de concision et écrire simplement *11 h 30* ou *11:30*. Là encore, les prépositions *de* et *ĝis* servent à noter des intervalles.

EN AUCUN CAS on ne peut utiliser la préposition *al*, en lieu et place du *à* français. *Al* signifie *vers*, *en direction de*, et ne peut servir que pour montrer un mouvement réel (*iri al Varsovio*) ou figuré (*paroli al iu*). Là encore, comme toujours en espéranto, il faut faire attention aux faux amis. Ce n'est pas parce qu'un mot espéranto ressemble à un mot français ou a la même origine qu'il a le même sens ou le même usage.

Lidia Zamenhof - nobla homo, tragika destino

François Lorrain



Lidia Zamenhof
bildfonto :
www.bahai.de
Lidia Zamenhof
Daughter
of Esperanto (George Ronald, Oksfordo 1985). Verkis ĝin Wendy Heller, usona bahaanino, kiu tiom interesiĝis pri ŝi, ke ŝi decidis skribi biografion. Por tio ŝi lernis Esperanton kaj dum kelkaj jaroj funde esploris ĉiujn disponeblajn originalajn dokumentojn. Ŝi ankaŭ intervjuis plurajn konitulojn de Lidia.

Lidia naskiĝis en 1904. Kiam ŝia patro forpasis en 1917, ŝi do aĝis dekdu aŭ dektri jarojn. Ŝi mem mortis en 1942 en la mortotendaro Treblinka.

Ŝi multe instruis Esperanton, laŭ la Csecio, kaj poste en Usono. Ege modesta kaj diskreta en la ordinara vivo, ŝi fariĝis tute alia, kiam ŝi instruis — vigle, atentokapte. Foje estis pli da ĉeestantoj je la fino de ŝia kurso, ol ĉe la komenco!

Ŝi ankaŭ esperantigis — bele — kelkajn verkojn de polaj aŭtoroj, interalie la faman romanon “Quo vadis?” de Henryk Sienkiewicz. Ŝi mem verkis precipe artikolojn en diversaj revuoj. Ŝi ofte prelegis en kongresoj; laŭ atestantoj, ŝi estis

elokventa oratoro.

Kiel siaj familianoj, ŝi ne observis la judan religion. Ŝi konvertiĝis al bahaismo, irandevena sed universaleca, pacama religio, kies doktrino parte similas la homaranismon de ŝia patro. Laŭ bahaismo, internacia lingvo, kiu povus esti Esperanto, estas nepra rimedo por tutmonda paco. Estas nun bahaanoj en ĉiuj partoj de la mondo, kaj okazas bahaa kunveno en ĉiu Universala Kongreso. Lidia iĝis fervora bahaanino kaj dediĉis sian tutan vivon al la disvastigo de Esperanto kaj bahaismo. Ŝi neniam edziniĝis.

Ŝi estis en Usono en 1938 kaj 1939, sed ŝi devis forveturi pro stultaj administrataj kaŭzoj. Ĉiuj provoj ebligis al ŝi tie resti fiaskis. Ŝi tre timis reveni al Eŭropo, konsciante, ke terura milito baldaŭ okazos. Sed ŝi ankaŭ deziris rekuniĝi kun sia familio. Do ŝi revenis al Varsovio.

Tuj post la germana invado de Pollando, ĉiuj Zamenhofoj estis arestitaj. Ŝia frato Adamo estis mortpafita, sed Lidia, Zofia (ŝia pli aĝa fratino) kaj Wanda (edzino de Adamo kaj patrino de la ankoraŭ nun vivanta Ludoviko Zaleski-Zamenhof) estis liberigitaj. Tiam sindonema polo, Józef Arszenyk, proponis kaŝi ŝin, sed ŝi rifuzis, por ne endanĝerigi lin.

Lidia kaj ŝia familio restis poste enŝlositaj en la varsovia geto. En tiu epoko, malfacila ĉie en Eŭropo, diverslandaj Esperantistoj sendis al ili pakaĵojn de nutraĵoj. Per leteroj

kaj poŝtkartoj tiutempe senditaj de ŝi (skribitaj en la germana, pro la nazia cenzuro), oni scias, ke ŝi ricevis almenaŭ kelkajn el tiuj pakaĵoj.

Germana Esperantisto, Fritz Macco, tiam Wehrmacht-soldato en Varsovio, trovis ŝin en la geto kaj proponis helpi ŝin fuĝi, sed ŝi rifuzis tion fari, por ne forlasi sian familion.

Wanda, kun ŝiaj fratino kaj filo, sukcesis fuĝi de la geto en aŭgusto 1942. Zofia, kiu estis kuracisto, mem decidis eniri trajnon forveturantan al Treblinka, dirante, ke tie homoj certe bezonos ŝian helpon. Lidia sekvis ŝin kelkajn monatojn poste.

La libro multe diras pri la bahaa movado, sed mi bedaŭras, ke ĝi preskaŭ nenion diras pri bahaismo mem. Tio estas grava manko, ĉar pli riĉenhava priskribo de bahaismo, pri kiu mi scias malmulton, certe helpintus min pli bone kompreni Lidian mem. Mi nur supra tiu religio tiom allogis ŝin. Eble tiaj informoj helpus heligi la etoson de la libro, ja iom pezan.

La nun konata, sed tiam tute ne antaŭvidebla tragika fino de Lidia iel malhele kolorigas la tutan libron. Por la aŭtorino, senteble estis malfacile distancigi sin de tiu kono por pli objekte priskribi ŝian vivon. Kompreneble, tio estus malfacila por kiu ajn verkisto. Interesa demando estas: kian libron oni skribus pri Lidia, se ŝi estus supervivinta la militon?

Pli da informoj pri ŝi kaj bahaismo oni trovos en Vikipedio.

Nova servo disponebla al la esperanta komunumo

Tim Morley

Ekde la komenco de decembro 2005, la retejo www.pledgebank.com estas je la dispono de la esperanta komunumo pro ĝia nova tutesperanta versio. PledgeBank (« PromesoBanko ») estas fondita de brita almozfondaĵo « mySociety », la kreinto de pluraj retejoj, kiuj celas doni simplajn, senteblajn avantaĝojn kadre de la civitana kaj komunuma aspektoj de niaj vivoj.

Ĝuste kiel la iama promeso, kiun promociis Zamenhof - *Mi promesas lerni Esperanton, sed nur se 10 milionoj da personoj faros same* - oni povas, per PledgeBank, krei promeson fari iun bonan agon kondiĉe ke iom da aliaj personoj helpas aŭ faros same. Ekzemple:

- *Mi promesas recikligi miajn rubaĵojn, sed nur se 100 samurbanoj faros same;*
- *Mi promesas donaci iom da mia tempo al Internacia Televido, sed*

nur se 10 aliaj personoj faros same;

- *Mi promesas konstrui utilan retejon, sed nur se 1000 personojn promesas kontribui al ĝi;*

- *Mi promesas sendi skatolon de libroj al iu afrika Esperanto-centro, sed nur se 15 aliaj personoj sendas al mi pliajn librojn por plenigi ĝin.*

La temo povas esti enmovada aŭ ekstermovada, kaj la celo povas esti loka (ekz. *Mi promesas organizi [iun okazaĵon] en mia loka E-klubo se 5 aliaj membroj helpas min*), nacia (*Mi promesas ĉeesti [iun] manifestacion se 200 aliaj personoj venos kune*) aŭ internacia (*Mi promesas estigi senpagan interretan kurson pri [io] se 15 personoj promesas sekvi ĝin*). En la mondo de Esperanto, plej multaj promesoj verŝajne estos internaciaj, sed ankaŭ estas aplikaĵoj ĉirkaŭ kongresoj, ekz. *Mi promesas prepari prelegon*

pri ekzotikaj herboj, sed nur se 20 personoj promesas ĉeesti kaj aŭskulti ĝin ĉe [iu kongreso].

Same kiel la kreintoj de la origina britangla versio, mi ne povas imagi ĉian eblan uzon de la servo, sed mi kredas, ke ĝi ja instigas al homoj fari bonajn agojn, kiuj alikaze ne fariĝus. Mi kredas ankaŭ, ke ĝi plene taŭgas al la esperantista komunumo, kiu enhavas amason da individuoj, kiuj jam montriĝis pretaj fari nekutiman paŝon por io, kion ili kredas farinda kaj subteninda.

Mi invitas vin viziti la novan esperantan vizaĝon de PledgeBank ĉe www.eo.pledgebank.com, eble subskribu unu el la jam ekzistantaj promesoj (i.a. de Renato Corsetti).

MEKARO

Normand Fleury

Ekde 2003, la Montreala, Otava kaj Toronta Esperanto-klubo kunorganizas turistan semajnfinojn dum la festo de la Reĝino/Patriotoj.

La 4^a MezKanada Renkontiĝo de Esperanto (MEKARO) okazos de la 20^a ĝis la 22^a de majo 2006 en Otavo, Ontario.

La programo entenas vizitojn

al muzeoj, komunajn manĝojn, kulturalan vesperon kaj multe pli. Eblas kunveturi el Montrealo se vi petas tion frue.

Vi devos mem zorgi pri via tranoktado sed la organizantoj pretas helpi vin je tio.

Se vi deziras partopreni, bonvolu tuj anonci tion al ni ĉar la organizantoj devas mendi

kunvenejon kaj restauraciojn laŭ la nombro da partoprenantoj.

Tuj sendu konfirmon al: informo@esperanto.qc.ca

Aŭskulti

Elfrancigis *Présence Bouvier*

Aŭskulti, tio eble estas la plej bela donaco,
kiun iu povas fari al alia,
Tion farante, oni diras al ĝi, ne per vortoj
sed per sia vizaĝo, sia okuloj, sia rideto
kaj per sia korpotuto : vi estas grava por mi,
vi interesas min, mi ĝojas, ke vi ĉeestas...

Aŭskulti unue egalas ne paroli,
aŭskulti egalas bonvenigi la alian,
ankaŭ agnoski ĝin, same kiel ĝi difinas sin,
sen anstataŭigi ĝin per tiu, kiun oni dezirus.

Aŭskulti, sen voli ke ĝi estu tia aŭ alia,
ekmalkovri ĝiajn kvalitojn,
ĝiajn proprajn.

Ankaŭ esti pozitive malfermita al ĉiuj ideoj,
al ĉiuj temoj, al ĉiuj vivspertoj, al ĉiuj solvoj,
sen opinii, sen juĝi, lasante al la alia ĝian spacon
kaj tempon por trovi sian propran vojon.

Esti atentema al iu, kiu suferas,
signifas ne doni al ĝi klarigon de ĝia sufero kaj ties solvon,
sed permesi al ĝi, ke ĝi trovu kaj esprimu
sian propran vojon por ne plu suferi.

Aŭskulti, tio estas doni al iu tion,
kion oni eble neniam ricevis :
atentemon, tempon, kormalferman ĉeeston.

Nova honora membro de ESK

Normand Fleury



*Maldekstre : Edmond Brent;
dekstre : Normand Fleury*

Dum Zamenhofa festo, la 17^{an} de decembro 2005, la prezidanto de ESK Normand Fleury, publike anoncis al la ĉeestantoj ke Edmond Brent (Kajmo) fariĝis honora membro de ESK. Kajmo delonge aktivas en la Esperantomovado ne nur en Montrealo sed ankaŭ tra Kanado kaj internacie. Li grave rolis en la eldonado de la kebekia verko « Nanatasis ». Ni kore gratulas lin.

MEKARO

Normand Fleury

Depuis 2003, les clubs d'espéranto de Toronto, d'Ottawa et de Montréal organisent conjointement une fin de semaine touristique lors de la fête des Patriotes (fête de la Reine). Le 4^e MezKanada Renkontiĝo de Esperanto (MEKARO) aura lieu du 20 au 22 mai 2006 à Ottawa.

Le programme comprend des

visites de musées, des repas en commun, une soirée culturelle et bien plus. Il est possible d'organiser du covoiturage à partir de Montréal; demandez-le le plus tôt possible.

Chacun doit veiller à se trouver un lieu pour coucher, mais les organisateurs sont prêts à vous

aider à ce niveau.

Si vous désirez participer, veuillez nous le faire savoir au plus vite, parce que les organisateurs ont besoin de connaître le nombre de participants pour réserver des restaurants et louer une salle de réunion adéquate. écrivez-nous: informo@esperanto.qc.ca

Montrealaj Esperanto-kunvenoj (MEK)

DATO	KIE	HORO	TEMO
ven. 31 ^a mart. 2006	MEDO **	20 h	Lingvoj - kiun lingvon vi ŝatus lerni ? Ĉu necesas savi malaperantajn lingvojn?
ven. 28 ^a apr. 2006	MEDO **	20 h	Kuirado - kuirarto
20 - 22 ^a majo 2006	Otavo		4 ^a MEKARO - Esperanto & turismo semajno Detaloj, kontaktu : informo@esperanto.qc.ca
ven. 26 ^a majo 2006	MEDO **	20 h	Pollando & Baltio prelego kun fotoj pri UK kaj IJK 2005
2-4 ^a junio 2006	Montrealo		6 ^a SEBO - Semajnfino por esperanto & biciklado. Detaloj: informo@esperanto.qc.ca
ven. 30 ^a junio 2006	MEDO **	20 h	Agrikulturo, ekologion kaj GMO (OGM france)
ven. 29 ^a sept. 2006	MEDO **	20 h	Elektota temo
6-9 ^a okt. 2006	Silvero (Usono)		ARE. Detaloj : vidu ĉe www.esperanto.qc.ca
ven. 27 ^a okt. 2006	MEDO **	20 h	Elektota temo
ven. 24 ^a nov. 2006	MEDO **	20 h	Elektota temo
sab. 16 ^a dec. 2006	Botanika Ĝardeno †	18 h	Decembra festo kaj komuna bufedo

**** Montreala Esperanto-Domo (MEDO):** 6358-A rue de Bordeaux, Montréal

Entre Papineau et De Lorimier.

Métro Beaubien, Autobus 18 Beaubien Est

Voir le site web pour un plan d'accès : www.esperanto.qc.ca

19 h *Horo por komencantoj, lernado, konversacio, demandoj pri la movado.*

Heure pour les débutants : conversation, questions, grammaire...

20 h *Anoncoj, libera babilado, libro - pruntado kaj - aĉetado, aliĝo al ESK.*

Annonces, emprunt ou achat de livres, de revues, adhésion à la SQE.

20 h 30 *Tema programo, diskuto, kvizo, ludo...*

Programme thématique, discussion, quizz, jeux...

† **Botanika Ĝardeno (Jardin Botanique) :** 4101, rue Sherbrooke Est, Montréal

Métro Pie-IX, stationnement payant

ENTREZ PAR LES SERRES, derrière le bâtiment administratif.

Por komentoj, proponoj, demandoj : informo@esperanto.qc.ca

En plus de la Société québécoise d'espéranto, il existe au Québec plusieurs clubs d'espéranto et un mouvement espérantiste. En voici les coordonnées.

Club d'espéranto de l'UdeM: udem@esperanto.qc.ca

McGill esperanto club: mcgill@esperanto.qc.ca

Club d'espéranto de l'UQAM: uqam@esperanto.qc.ca

La Rano, club d'espéranto du Saguenay - Lac - Saint-Jean : www.kvakejo.net

MEMO, Montreala Esperanta Movado : www.esperanto.org/montreal

Pour ajouter votre club à cette liste ou annoncer une activité, écrivez-nous à riverego@esperanto.qc.ca